

& Radio, ...adiaŭ:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 370 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Balado pri maltima formiko.>

(#Melodio:

<:37> (/mimi dodo mimi dodo; SoSo rere fafa rere; SoSo rere fafa rere; SoSo dodo mimi dodo;

(#Rekantaĵe: dodo fafa lala fafa; dodo mimi soso mi; rere fafa rere; SoSo mimi soso mi; re emi fare Tire do o;)

)×10)+

(&Strofoj:

,& 1:

'1 /Pli insiste ol gekatoj ; Dum printempa nokto logas ; La radioaparatoj ; De l' najbaroj monologas..

(×:; **Dancu per la ses piedoj ; Dancu paŝon post la paŝ' ; Ĉiun paŝon kredu ; kaj ne metu ĝin en maŝ' ; Dancu paŝon post la paŝ'.**)

'2 Certe ankaŭ mi humile; Benas bonon de l' progreso, ; Sed, se nun, laŭparolile ; Rendevuis al kongreso

'3 Kaj en mia paca domo ; Ĉiuj ondoj manifestas, ; Mi, en mia propra nomo, ; Rajte plendas kaj protestas.

'4 Krome, ĉio – ĉu muziko, ; Konferenco, bankbilanco, ; Episkopa fastprediko, – ; Tie ĉi fariĝas.. danco!

,& 2:

'5 Teretaĝe unu kaptas; Ondojn el polusaj limoj ; Kaj laŭ ili tuj adaptas ; Blakbotomon de l' Eskimoj.

'6 Ĉe l' tajloro same bruas, ; Ĉar la tuta familio ; Fokstrotante sin instruas ; Pri l' Einsteina Teorio!

'7 Super mi studento prenas ; Jurprelegon el Berlino ; Kaj – ĉar ĝin li ne komprenas – ; Li ĝin dancas kun fraŭlino!

'8 Sube, flanke, supre, – ĉie ; Ĉirkaŭ mi radifuneloj ; Komplotadas grake-krie ; Kontraŭ paco de l' oreloj..

,& 3. *Helpokrio (per radio):*

'9 Ho, mondfora insulano, ; Diru, skribu tuj al mi, ; Ĉu luebla nur kabano ; estas ie ajn ĉe vi,

'10 Kie homo kun aŭdsento, ; For de l' mod-epidemi', ; Vivi povus sub tegmento ; SEN RADIO! Mi kun mi..